# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novaĵletero de Ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

**RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ**



**Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale**

**PLENUMITA 02/05/2024 sescentokdekkvina eldono (unua eldono 26/09/2011)**



## Subtenu vian Novaĵleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

**La limdato por sendi kontribuaĵon al AE estas mardo en la vespero. Merkredo estas tro malfrua .**

Alternativaj Novaĵoj https://www.greanvillepost.com/ https://titaniclifeboatacademy.org/ https://globalsouth.co/

**Pasintaj „Aŭstraliaj Esperantistoj" korektitaj atingeblas je la suba adreso**
Ctrl+klaku la veran ligilon) http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo
Ĉirkaŭ unu semajnon post la ĝenerala elsendo, la korektitaj kopioj estas sendataj al AEA. (Sen #)

**3ZZZ** Pro tio ke Sandor Horvath, revenante de la labortagoj en Sidnejo, haltis en Melburno, la ĉefa temo de la elsendo estas arkivoj, kiel asocio povas konservi arkivojn, kiuj estos utilaj. Krom tio estas atentigo pri la vera signifo de kelkaj feriaj tagoj en Japanujo kaj Aŭstralio.

La 3an de junio 2024 okazos la jarkunveno de la grupo Esperanto en 3ZZZ. Ĝi estas jaro kiam oni renovigos la estraron. Se vi deziras kanditatiĝi bonvolu sciigi nin *Franciska Toubale*



**Esperanta Retradio** Donas bonan Ĉirkau -5 minutan aŬskultadon kaj legadon Ĉiun tagonNe estas facila elekti el la ĉiuj tagaj programoj Do aŭskultu ĉiujn.
DEĈIFRI LA LINGVON DE BALENOJ 23A DE APRILO 2024 (*Roger Springer*)

## La Manlia Esperanto-Klubo



La Manlia grupo kunvenas je 10.30 atm ĝis 12ptm la unuan kaj trian sabatojn de la monato Unu taso da klubpagita kafo atendos vin. Ni renkontiĝas ĉe la oceana fronto kontraŭ la Restoracio Bluewater, Suda Stejno. La 4a de majo estos la unua sabato. Venu! 02 976 6320



**Studentoj ĉirkaŭ la mondo protestas kontraŭ la militaj agoj de la registaroj.**




Kaŝpafistoj protektas la policojn

# *Si vis pacem, para bellum* ... Se vi volas pacon, preparu militon.

Antikva saĝaĵo, ĉu ne, kaj des pli impona, ĉar ĝi estas en la latina? Ĝi gvidis la eksteran politikon de la romianoj -- ke ĝi estis uzata por sekurigi la potencon de la regantaj klasoj en la Imperio mem, ni ne menciu -- kaj ĝi validas ankoraŭ hodiaŭ, ĉu ne?

Bedaŭrinde la diro estas tute falsa. Ĝi devus esti: *se vi preparas militon, vi garantias, ke iam estos milito.*


Se miaj najbaroj scias, ke mi preparas militon, ke mi akiras ĉiam pli da armiloj, kion ili faru? Kompreneble ili mem devas armi sin, eventuale formi aliancojn kun aliaj najbaroj kontraŭ mi. La Unua Mondmilito montris, ke aliancoj povas konduki en multflankan militon.

Ĉu la homaro ne sufiĉe evoluis por kompreni la tragedian falsecon de tiu antikva slogano? Se oni observas la naciismon, la prestiĝavidon de la aktualaj registaroj, kaj la ŝafosimilan pretecon de multaj civitanoj obeadi, la respondo estas deprimiga.

Aŭstralio estas relative riĉa mezranga lando, kaj unuavide ĝi ne havas evidentan "malamikon". Sed ekde 1941 niaj registaroj "preparas militon" siamaniere, ke ili nepre volas kaŭri sub la "protekta egido" de Usono, tiu superpotenco kun siaj militbazoj sur ĉiuj kontinentoj, kaj en multaj landoj rigardata kiel la ĉefa minaco al paco.

Kie Usono militas, tien Aŭstralio sendas soldatojn: al Koreio, Vjetnamio, Afganio, Irako. Krom tio, Usono regas partetojn de Aŭstralio, kies instalaĵoj ne permesas eniron eĉ al la aŭstralia ĉefministro. Kiam usonaj droneoj detruas homojn en Mezoriento, "niaj" instalaĵoj gvidas la droneojn.

Fakte, la sola pravigo de eventuala alilanda atako kontraŭ Aŭstralio estus ĝuste tiu "danĝera alianco" (esprimo de iama konservativa ĉefministro Malcolm Fraser). Estas tempo por iom modifi la antikvan saĝaĵon: *si vis pacem, para pacem.*



*Trevor Steele*




## ELMINU LINGVOBAROJN PER LINGVO NEŬTRALA, PLI FACILE LERNEBLA!

Permesu internacian komunikadon surbaze de reciproka respekto kaj kompreno.

Mi havas etan skribaĵon se vi volas aldoni ĝin al estonta AE. Mi skribis ĝin por la skribado kurso de Londono Esperanto-Klubo. Eble vi povos aldoni la ligilon:
https://londonaesperantoklubo.com/course.html?CourseId=8



Dankon Ŝohano *Shayne Power*